

KONSULTIĜOJ DE SOCIALISMLANDAJ ESPERANTO-ORGANIZAJOJ

Entute estis dek Konsultiĝoj. La lastaj, en inversa ordo, okazis: X-a, Karl-Marx-Stadt (GDR), marto 1977;

IX-a, Moskvo, decembro 1976;

VIII-a, Krakovo (Pollando), aprilo 1976.

Kiel partopreninto de tiuj tri Konsultiĝoj, mi povas komuniki jenon.

En ĉiuj ĉi Konsultiĝoj partoprenis reprezentantoj de Bulgara, Ĉeĥa, Hungara, Pola, Slovaka Esperanto-Asocioj, Centra Laborrondo Esperanto (GDR) kaj Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj.

Ordinare la Konsultiĝojn partoprenis po du personoj de ĉiu organizaĵo (kutime - la prezidanto kaj la sekretario). Ekde la VIII-a (escepte la Moskvan) ilin partoprenas ankaŭ la gvidantoj de la junularaj sekcioj de plejparto da tiuj organizaĵoj.

La celoj de la Konsultiĝoj estas:

interŝanĝo de informoj pri la fariĝa, farata kaj planita laboro enkadre de la landaj E-organizaĵoj;

pritrakto de eblaj komunaj duflankaj aŭ multflankaj entreprenoj;

ellaboro de komuna starpunkto koncerne agadon enkadre de la internaciaj (tutmondaj) E-organizaĵoj kaj pritakso de ties politiko;

laboro enkadre de MEM (Mondpaca Esperantista Movado) kaj MEM-agado enkadre de Tutmonda pacmovado (inkluzive partoprenon de MEM-delegitoj en diversaj pacforumoj. La lastan, kiu okazis januare 1977 en Moskvo, partoprenis Nikola Aleksiev, kiel MEM-prezidanto, kaj Magomet Isajev, kiel MEM-vicprezidanto);

propagand-aranĝoj okaze de gravaj datrevenoj (ekzemple, lige kun la 60-jara jubileo de la Granda Oktobra socialisma revolucio tiajn aranĝojn large planas ĉiuj E-organizaĵoj, partoprenantaj la Konsultiĝojn);

kunordigo de esperantologiaj esploroj;

eltrovo de eblecoj por praktika aplikado de Esperanto ekster la E-movado;

eldonado de "Paco", "Pacaktivulo", naciaj presorganoj kaj solvado de abondemandoj;

pridiskuto de problemoj pri E-instruado kaj multaj aliaj problemoj.

La konkludoj de la diskutoj aperas en formo de rekomendoj por la praktika laboro. Devigaj decidoj ne povas ekzisti, ĉar Konsultiĝo ne estas leĝdona organo, kaj krome - en diversaj landoj estas malsamaj eblecoj, sekve tiuj rekomendoj ne ĉiam estas samrange efektiveblaj. Oni strebas akcepti rekomendojn nur realismajn, preferas starigi malpli da taskoj kaj pli profunde analizi la eblecojn.

La ĉefa ideo de la Konsultiĝoj estas: la E-organizaĵoj en sia konstanta agado devas apogi sin je la politiko de siaj ŝtatoj kaj de la tuta socialismlandara komuno, kontribui propagandon de marksisma-leninisma ideologio, aktive partopreni batalon por paco kaj ĝenerala progreso, propagandi ideojn de laborula internaciismo, pere de Esperanto propagandi la naciajn kulturojn, large kunlabori kun neesperantista medio.

La agado en neesperantistaj medioj devas celi, ke gvidantoj de

neesperantistaj organizaĵoj diru: "Ni eble povas disputi kun esperantistoj pri la rolo de Esperanto, pri la problemoj de internacia lingvo, tamen ni vidas, ke esperantistoj faras utilon por la socio per sia internacia laboro."

Se paroli konkrete pri la lasta, X-a Konsultiĝo en GDR, kiun partoprenis de nialanda E-Komisiono du personoj, nome V. Samodaj (viceprezidanto) kaj A. Berjoza (respondeca sekretario), - do krom la oficialaj kunsidoj, kies ĝenerala enhavo estas menciita supre, la sovetaĵ delegitoj partoprenis ankaŭ renkontiĝojn kun esperantistoj en la urboj Karl-Marx-Stadt, Halle, Potsdam kaj Berlin. Dum tiuj renkontiĝoj en neoficiala atmosfero (kun biero aŭ teo) ni laforamis la germanajn samideanojn pri la vivo de nia lando en la jubilea jaro, pri la porpaca politiko de Sovetunio, pri la agado de la E-Komisiono kaj E-movado en Sovetunio, kaj respondis multajn demandojn pri la menciitaj temoj.

La germanaj amikoj de ĉiuj kvar urboj petis min transdoni varmajn salutajn kaj bondezirojn al la sovetaĵ esperantistoj. La samon petis ankaŭ la partoprenintoj de la Konsultiĝo el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Pollando.

Kun plezuro mi plenumas tiun peton.

V. Samodaj (Moskvo).

PRI LA DATOJ DE OkSEJT-19

La organizantoj de OkSEJT-19 informas, ke la tendaro okazos je du tagoj pli frue, ol oni planis antaŭe, do la 3-an - 12-an de aŭgusto. La SEJM-Konferenco okazos la 13-an - 17-an de aŭgusto.

PROJEKTO DE PROGRAMO DE OkSEJT-19

Ĝ i n t a g a j e r o j

- 7.00 - 7.30 - vekiĝo, matena gimnastiko, lavado.
- 7.30 - 8.00 - matena kuirado.
- 8.00 - 9.00 - matenmanĝo.
- 9.00 - 12.00 - perfektiga lingvokurso (krom la 1-a kaj 10-a tagoj); tradukista kurso (krom la 1-a, 3-a, 5-a, 7-a, 10-a).
- 13.00 - 14.00 - tagmanĝo.
- 19.00 - 20.00 - vespermanĝo.

L a n n a t a g o

- 8.00 - 13.00 - veno de la tendaranoj, registrado, enloĝigo.
- 14.00 - 15.00 - kunveno de SEJM-Konsilantero kaj kunsido de la Tendara Estraro.
- 15.00 - 19.00 - solena malfermo.
- 20.00 - 23.00 - interkona vespero, dancoj.

L a d u a t a g o

- 12.00 - 13.00 - instruado de novaj kantoj; pedagogia seminario.
- 14.00 - 15.00 - pedagogia seminario (daŭrigo).
- 15.00 - 17.00 - E-Universitato.
- 17.00 - 19.00 - sportkonkursoj.
- 20.00 - 23.00 - vespero "Hej de, junulinoj!".

L a t r i a t a g o

- 9.00 - 12.00 - kunveno de klubaj aktivuloj.
- 12.00 - 13.00 - malfermo de E-butiko.

- 14.00 - 15.00 - preparo al la festo de naskigintoj.
- 15.00 - 17.00 - regionaj kunvenoj.
- 17.00 - 19.00 - somera prelegejo.
- 20.00 - 23.00 - festo de naskigintoj.

L a k v a r a t a g o

- 12.00 - 13.00 - instruado de novaj kantoj.
- 14.00 - 19.00 - ekskurso al Poltavo.
- 20.00 - 23.00 - ĉebalta vespero.

L a k v i n a t a g o

- 9.00 - 12.00 - preparo de la tendara ekspozicio kaj de KGS.
- 12.00 - 13.00 - komuna fotado.
- 14.00 - 16.00 - fakaj kunvenoj.
- 16.00 - 18.00 - E-Universitato.
- 18.00 - 19.00 - malfermo de la tendara ekspozicio.
- 20.00 - 23.00 - Konkurso de Gajaj kaj Spritaj.

L a s e s a t a g o

- 12.00 - 13.00 - instruado de novaj kantoj; pedagogia seminario.
- 14.00 - 16.00 - somera prelegejo.
- 16.00 - 17.00 - solena kunveno, dediĉita al la 60-jara jubileo de la Granda Oktobra socialisma revolucio.
- 17.00 - 19.00 - naturamika ekskurso.
- 20.00 - 21.00 - demonstrado de lumbildoj kaj filmoj.
- 21.00 - 23.00 - centro-rusia vespero.

L a s e p a t a g o

- 9.00 - 12.00 - preparo de Neptun-festo.
- 12.00 - 13.00 - E-Universitato.
- 14.00 - 17.00 - Neptun-festo.
- 17.00 - 18.00 - komsomola kunveno.
- 18.00 - 19.00 - preparo de murgazetoj kaj de Ivan-Kupala festo.
- 20.00 - 23.00 - ukraina vespero; viktorigo "Poltavo", Ivan-Kupala festo k.a.

L a o k t a t a g o

- 12.00 - 13.00 - somera prelegejo.
- 14.00 - 15.00 - konkurso de murgazetoj.
- 15.00 - 17.00 - E-Universitato.
- 17.00 - 18.00 - libera tribuno: disputoj pri aktualaj problemoj.
- 18.00 - 19.00 - preparo de la vespero "Hej de, junuloj!".
- 20.00 - 23.00 - vespero "Hej de, junuloj!".

L a n a ŭ a t a g o

- 12.00 - 13.00 - instruado de novaj kantoj.
- 14.00 - 16.00 - E-Universitato.
- 16.00 - 18.00 - libera tribuno: diskuto "E-tendaro en estonte".
- 18.00 - 19.00 - interpretista konkurso; preparo de la adiaua ballo.
- 20.00 - 23.00 - adiaua ballo.

L a d e k a t a g o

- 9.00 - 11.00 - ekzameno per progresantoj; preparo de la solena fermo.
- 11.00 - 13.00 - promociado de novuloj al esperantistoj; solena fermo.

- 14.00 - 16.00 - tendara adiaŭo "Ĝis sekva tendaro"; kunsido de la Tendara Estraro.
16.00 - 19.00 - forveturo de la tendaranoj; veno de la konferencanoj.
20.00 - 23.00 - vespero de geamikoj.
Prepara Komitato.

PROJEKTO DE PROGRAMO DE OrSEJT-19

O r d i n a r a t e n d a r a t a g o

- 8.00 - 8.40 - leviĝo, matena gimnastiko, lavado.
8.40 - 9.00 - matena kunveno.
9.00 - 10.00 - matenmanĝo.
10.00 - 12.00 - E-Universitato: kurso "A" por progresantoj, kurso "B" por ceteraj.
12.00 - 14.00 - libera tempo.
14.00 - 15.00 - tagmanĝo.
15.00 - 17.00 - tradukigita kurso, paralele - instruado de kantoj.
17.00 - 19.00 - fakaj aŭ regionaj kunvenoj, diversaj konkursoj.
19.00 - 20.00 - vespermanĝo.
20.00 - 23.00 - vesperaj aranĝoj.

L a ŭ t a g a j p r o g r a m e r o j

La 31-an de julio

- tage, vespere - veno kaj registrado de la tendaranoj, konsistigo de la PP-grupoj.
18.00 - 19.00 - kunsido de grupestroj kaj turismaj gvidantoj.

La 1-an - 3-an de aŭgusto

turisma marŝo de la PP-grupoj.

La 4-an de aŭgusto

- matene - veno de la grupoj, prepariĝo al la malfermo kaj interkona vespero.
16.00 - 18.00 - solena malfermo de la tendaro.
18.00 - 19.00 - kunveno de SEJM-Konsilantaro kaj kunsido de la Tendara Estraro.
20.00 - 23.00 - interkona vespero.

La 5-an de aŭgusto

- 20.00 - 23.00 - belarta konkurso "Oriento-77".

La 6-an de aŭgusto

- 10.00 - 12.00 - mitingo ĉe la monumento de 96 Karabaŝaj laboristoj.
12.00 - 14.00 - E-Universitato.
20.00 - 23.00 - "Rida vespero".

La 7-an de aŭgusto

- 20.00 - 23.00 - festo de naskiĝtaguloj.

La 8-an de aŭgusto

- 10.00 - 14.00 - Neptun-festo, ŝipekskurso laŭ Turgojak
15.00 - 17.00 - E-Universitato.

20.00 - 23.00 - koncerto por la ripozdomo "Turgojak", paralele aŭ poste - demonstrada de lumbildoj.

La 9-an de aŭgusto

20.00 - 23.00 - Konkurso de Gajaj kaj Spritaj.

La 10-an de aŭgusto

17.00 - 19.00 - soleza fermo de la tendaro.
20.00 - 23.00 - adiaŭa balo "Malakita skatolo".

La 11-an de aŭgusto

matene - disveturo, ekskursoj al Ilmena mineralogia rezervejo kaj al Beljabinŝk; por la konferencanoj - organizita forveturo al Poltava.

Prepara Komitato.

STUDU TRADUKI!

Karaj tradukemuloj! Malgraŭ longa pasivado, mi nun deziras intensensigi la vivon de la Traduka fako. Multaj dezirantoj ekposedi la arton traduki ne scias, de kio komenci, tial oni tradukas ĉion, kio submanas: de klasikuloj ĝis fiŝreklamoj. Tia traduksperto estas bakita nur de unu flanko: havigante vortan provizon, ĝi preskaŭ ne permesas kritikan analizon de tradukata verko kaj tradukaĵo. Ja tradukanto fakte ne ricevas oponojn, krom tiuj de eventuala redaktanto, por kies rolo plej ofte estas elektata la fakestro. Tiu elekto estas maltrafa, ĉar kutime opinio de la estro elvokas respektan konsenton de la tradukanto, kaj la lasta akceptas ĝin kiel la ĝustan. Tio estas nedezirinda fenomeno. Krome, la fakestro ne havas sufiĉe da eblecoj por enletere fari detalan analizon de ĉies traduko.

Bazante min sur la dirito, mi proponas sekvan skemon por la laboro de la Traduka fako. Ni ne traduku por traduki - ni lernu tradukante. Tial ĉiujn tradukemulojn mi grupigos po tri personoj laŭ la lingvonivelo. Ĉiu ano de trio tradukas la saman tekston, reskribas la tradukon kaj sendas ĝin al la ceteraj du grupanoj. Tiel ĉiu havas eblecon kompari sian varianton kun la du alipersonoj. Dum la komparo li igas redaktanto por la aliaj du personoj, kaj samtempe vole aŭ nevole li kritike analizas sian tradukon, eltrovas neglataĵojn ktp. Sian konsenton aŭ nekonsenton li informu al siaj du kunuloj.

Ĉe tia formo de kunlaboro la tradukantoj havos eblecon diskuti inter si, serĉi en libroj pruvon kaj apogon por siaj opinioj. Ili do tradukos aktive. En ĉiuj komplikaj okazoj oni turnu sin al la fakestro.

Lau konversacioj kun esperantistoj oni povas atesti, ke nia parolstilo tre lamas. Tial mi insiste rekomendas, ke ĉiu tradukanto havu kaj konstante konsultu la libron de F. Faulhaber "Ne tiel, sed tiel ĉi". koncerne la librojn pri la tradukarto: surbaze de la venontaj respondoj al la proponataj sube demandoj, mi indikos 1 - 2 verkojn plej havatajn, al kiuj ni turnu nin plej ofte en nia laboro. La liston de rekomendinda literaturo pri tradukado vi povas trovi en "A"-1(28), p.9.

La proponata sistemo de laboro havas la celon ne traduki por publikigo, sed aktivan studadon de la tradukarto kaj profundigon de la lingvosciroj. Ĝi estas ne por kelkaj monatoj, sed por pli daŭra periodo kaj ebligas ĉiumomente aliĝi al la kurso kaj formi novajn grupojn. Krom tradukado de belartaj tekstoj, ni praktikos ankaŭ la soci-politikajn.

Fine mi petas ĉiujn legantojn sendi siajn opiniojn kaj proponojn

por la laboro de la fako. La dezirantoj traduki krome respondu al la sekvaj demandoj:

1. Homo, familinomo, adreso.
2. Jaro de esperantistiĝo.
3. Lingvoposedo.
4. Ĉu partoprenis jam en tradukistaj kursoj kaj tradukistaj konkursoj organizataj de SEJM? Kiam?
5. Kiujn verkojn tradukis, tradukas?
6. Kiujn librojn pri la tradukarto posedas?

V. Ebel, estro de la Traduka fako
(656099 Barnaul-99, ab. jaŝĉik 83).

≡ ≡ ≡

Ĉi-kaze estas aldonata la rakonto de Baĵov "Solneĉnij kamenj", proponata por la tradukista konkurso-77. La teksto estas elektita de la estimata mastrino de la orienta SEJT - L. Novikova. Mi longe meditis antaŭ ol publikigi ĝin, ja la teksto estas "ŝtonriĉa" eĉ por spertaj tradukistoj. Sed du pensoj plene firmigis mian decidon. Unue, ke la estimata tendarmastrino faros la tendaron same mozaika, kiel riĉe estas prezentita en la rakonto la ŝtona trezoro de Uralo. Due, ni "lernu naĝi en profunda akvo". Tial ek al la plumoj, geamikoj! Kaj nenia "kamennij mozg - kaminj" fortimigu vin. Estu inventemaj en elekto de viaj tradukvariantoj.

La konkurson rajtas partopreni esperantistoj kun E-aĝo de 1887 ĝis 1977. La limdato por sendi la konkursaĵojn estas la 15-a de julio. La konkursaĵoj ricevitaj post la limdato estos kontrolataj ekster la konkurso.

Sukceson al vi!

V. Ebel.

П. П. Бажов

СОЛНЕЧНЫЙ КАМЕНЬ

Против нашей Ильменской каменной кладовухи, конечно, по всей земле места не найдёшь. Тут и спорить нечего, потому - на всяких языках про это записано: в Ильменских горах камни со всего света лежат. Такое место, понятно, мимо ленинского глаза никак пройти не могло. В двадцатом году Владимир Ильич самоличным декретом объявил здешние места заповедными. Чтоб, значит, промышленников и хитников всяких по загривку, а сбергать эти горы для науки, на предбудущие времена. Дело будто простое. Известно, ленинский глаз не то что по земле, под землёй видел. Ну, и эти горы предусмотрел. Только наши старики горщики всё-таки этому не совсем верят. Не может, дескать, так быть. Война тогда на полную силу шла. Без случая это дело не прошло. И по-своему рассказывают так.

Жили два артельных брата: Максим Вахоня да Садык Узеев, по прозвищу Сандугач. Один, значит, русский, другой из башкирцев, а дело у них одно - с малых лет по приискам да рудникам колотились и всегда вместе. Большая, сказывают, меж ними дружба велась, на удивление людям. А сами друг на дружку нисколько не походили. Вахоня - мужик тяжёлый, борода до пупа, плечи ровно с подставышем, кулак - глядеть страшно, нога медвежья и разговор густой, буторовый. Потихоньку загудит, и то мух в сторону на полсамени относит, а характеру мягкого. По пьяному делу, когда какой заноза раздражит, так только пригрозит: "Отойди, парень, от греха! Как бы я тебя ненароком не стукнул."

Садык ростом не вышел, из себя тончавый, вместо бородёнки

семь волосков, и те не на месте, а жилу имел крепкую. Забойщик, можно сказать, тоже первой статьи. Бывает ведь так-то. Ровно и поглядеть не на кого, а в работе податен. Характера был веселого. Попеть, и поплясать, и на курае подудеть большой охотник. Недаром ему прозвище Сандугач дали, по-нашему соловей.

Вот эти Максим Вахоня да Садык Сандугач и сошлись в житьё на одной тропе. Не всё, конечно, на казну да хозяев добывали. Бывало, и сам-друг пески перелопачивали, — свою долю искали. Случалось, и находили, да в карманах не залежалось. Известно, старательскому счастью одна дорога была показана. Прогуляют всё, как полагается, и опять на работу, только куда-нибудь на новое место: там, может, веселее.

Оба бессемейные. Что им на одном месте сидеть! Собрали котомки, инструмент прихватили — и айда.

Вахоня гудит: "Пойдём поглядим, в каком месте люди хорошо живут:" Садык веселенько шагает да посмеивается: "Шагай, Максимка! Новым мистам золотой песок сама рука липнет. Дорогой каминь барадам скажит. Один раз твой барада полпуда станит." — "У тебя небось ни один не задержится," — отшучивался Вахоня и лешачинным общаем гогочет: хо-хо-хо.

Так вот и жили два артельных брата. Хлебнули сладкого досьта: Садык в работе правый глаз потерял, Вахоня на левое ухо совсем не слышал.

На Ильменских горах они, конечно, не раз бывали.

Как гражданская война началась, оба старика в этих же местах оказались. По горняцкому положению, конечно, оба по винтовке встали и пошли воевать за Советскую власть. Потом, как Колчака в Сибирь отогнали, политрук и говорит: "Пламенное, дескать, вам спасибо, товарищи старики, от лица Советской власти, а только теперь, как вы есть инвалиды подземного труда, подавайтесь на трудовой фронт. К тому же, — говорит, — фронтную видимость нарушаете, как один кривой, а другой глухой."

Старикам это обидно, а что поделаешь? Правильно политрук сказал — надо поглядеть, что на приисках делается. Пошли сразу к Ильменям, а там народу порядком набилось, и всё хита самая последняя. Этой ничего не жаль, лишь бы рублей побольше зашибить. Все ямы, шахты живо засыплет, коль выгодно покажется. За хитой, понятно, купец стоит, только себя не оказывает, прячется. Заподумывали наши старики — как быть? Сбегали в Миас, Златоуст, обсказали, а толку не выходит, отмахиваются: "Не до этого теперь, да и на то главные есть."

Стали спрашивать про эти главки, в голове муть пошла. По медному делу — одна главка, по золотому — другая, по каменному — третья. А как быть, коли на ильменских горах всё есть. Старики тогда и порешили: подадимся до самого товарища Ленина. Он небось найдёт время.

Стали собираться. Только тут у стариков рассорка случилась. Вахоня говорит: "Для показу надо брать один дорогой камень, который в огранку принимают. Ну, и золотой песок тоже." А Садык своё заладил: всякого камня образец взять, потому дело научное. Спорили, спорили, на том договорились: каждый соберёт свой мешок, как ему лучше кажется.

Вахоня расстарался насчёт цирконов да фенакитов. В Кочкарь сбегал, сговорил там эвклазиков синеньких да розовых топазиков. Золотого песку тоже. Мешочек у него аккуратный вышел, и камень всё — самоцвет. А Садык наворотил, что и поднять не в силах. Вахоня грохочет: "Хо-хо-хо! Ты бы все горы в мешок забил! Разберись, дескать, товарищ Ленин, которое к делу, которое никому не надо." Садык на это в обиде. "Глупый, — говорит, — ты, Максимка, человек, коли так бабку Ленина понимаешь. Ему научность надо, а базарная

цена камню — наплевать."

Поехали в Москву.

Без ошибки, конечно, в дороге не обошлось. В одном месте Вахоня от поезда отстал. Садык хоть и в сердцах на него был, сильно запечалился, захворал даже. Как-никак всегда вместе были, а тут при таком важном деле разлучились. И с двумя мешками камней одному хлопотно. Ходят, спрашивают, не соль ли в мешках для спекуляции возьмёшь? А как покажешь камни, сейчас пойдут расспросы, к чему такие камни, для личного обогащения али для музея какого? Одним словом, беспокойство.

Вахоня всё-таки как-то исхитрился, догнал поезд под самой Москвой. До того друг другу обрадовались, что всю вагонную публику до слёз насмешили: обниматься стали. Потом опять о камнях заспорили, который мешок нужнее, только уж помягче, с шуткой. Как к Москве подъезжать стали, Вахоня и говорит: "Я твой мешок таскать буду. Мне сподручнее и не столь смешно. Ты поменьше, и мешок у тебя будет поменьше. Москва, поди-ко, а не Миас! Тут порядок требуется."

Первую ночь, понятно, на вокзале перебились, а с утра пошли по Москве товарища Ленина искать. Скоренько нашли и прямо в Совнарком с мешками ввалились. Там спрашивают, что за люди, откуда, по какому делу. Садык отвечает: "Бачка Ленин желаем камень казать."

Вахоня тут же гудит: "Места богатые. От хиты ухранить надо. Дома толку не добились. Беспременно товарища Ленина видеть требуется."

Ну, провели их к Владимиру Ильичу. Стали они дело обсказывать, торопятся, друг дружку перебивают.

Владимир Ильич послушал, послушал и говорит: "Давайте, други, поодиночке. Дело, гляжу, у вас государственное, его понять надо."

Тут Вахоня, откуда и притяг взялась, давай свои дорогие камешки выкладывать, а сам гудит: из такой ямы, из такой шахты камень взял, и сколько он на рубли стоит.

Владимир Ильич и спрашивает: "Куда эти камни идут?"

Вахоня отвечает — для украшения больше. Ну, там, перстни, серьги, буски и всякая такая штука. Владимир Ильич задумался, полюбовавшись маленько камешками и сказал: "С этим погодить можно."

Тут очередь до Садыка дошла. Развязал он свой мешок и давай камни на стол выбрасывать, а сам приговаривает: "Амазон-камень, калумбит-камень, лабрадор-камень..."

Владимир Ильич удивился: "У вас, смотрю, из разных стран камни."

— "Так, бачка Ленин! Правда говоришь. Со всякой стороны камень сбегался. Каменный мозг-камень, и тот есть. В Еремеевской яме солидный камень находили."

Владимир Ильич тут улыбнулся и говорит: "Каменный мозг нам, пожалуй, ни к чему. Этого добра и без горы найдётся. А вот солнечный камень нам нужен. Веселее с ним жить."

Садык слышит этот разговор и дальше старается: "Потому, бачка Ленин, наш камень хорош, что его солнышком крепко прогревает. В том месте горы поворот дают и в степь выходят."

— "Это, — говорит Владимир Ильич, — всего дороже, что горы к солнышку повернулись и от степи не отгораживают."

Тут Владимир Ильич позвонил и велел все камни переписать и самый строгий декрет изготовить, чтоб на Ильменских горах всю хиту прекратить и место это заповедным сделать. Потом поднялся на ноги и говорит: "Спасибо вам, старики, за заботу. Большое вы дело сделали! Государственное!" — и руки им, понимаешь, пожал.

Ну, те, понятно, вне ума стоят. У Вахони вся борода слезами, как росой, покрылась, а Садык бородёнкой трясёт да приговаривает: "Ай, бачка Ленин! Ай, бачка Ленин!"

Тут Владимир Ильич написал записку, чтоб определить стариков

сторожами в заповедник и пенсии им назначить.

Только наши старики так и не доехали до дому. По дороге в ту пору, известно, как возили. Поехали в одно место, а угадали в другое. Война там, видно, кипела, и, хотя один был глухой, а другой кривой, оба снова воевать пошли.

С той поры об этих стариках и слуху не было, а декрет о заповеднике вскорости пришёл. Теперь этот заповедник Ленинским зовётся.

Примечания:

1. Хитник - грабитель, вор; хита - грабители, хищники.
2. Курай - башкирский музыкальный инструмент, род дудки, свирели.
3. Бутор - шум, гам, крик (ср. будоражить).

EVITI DUOBLIGON

Dum la lasta SEJM-Konferenco estis grandaj debatoj pri la neceso de nova urĝa informilo. Nun ĝi nomiĝas "Kurte" kaj aperadas pli-malpli regule. Mi ne parolu pri la urĝeco de ĝiaj informoj. Sed mi volas averti ĉiujn SEJM-anojn, kiuj eble ne tre bone komprenas, ke SEJM elspezas por siaj informiloj sufiĉe grandan sumon. Kaj estas zorgo ne nur de la Komitato laŭeble malpligrandigi la elspezojn.

Do, la aŭtoroj! Bonvolu direkti viajn materialojn al unu adreso: aŭ por "Kurte", aŭ por "Aktuale". Ni evitu la nenecesan duobligon de la sciigoj en ambaŭ informiloj, kiel estas nun (ekz., la dankesprimoj de A. Vebeliunas kaj la informo pri koresponda E-kurso en Krasnojarsk aperis kaj en en N^o13 de "Kurte", kaj en N^o7(40) de "Aktuale").

D. Cibulevskij, v/p pri financaj aferoj.

EL VIDPUNKTO DE "LIRIKULO"

Antaŭ dekelkaj jaroj en la gazetaro ekiĝis la disputo inter "lirikuloj" kaj "fizikuloj". En tiu disputo neniu venkis kaj neniu malvenkis. Verŝajne la saman rezulton donos la esperantista disputo pri "ilo" kaj "ideo". Tamen kelka utilo certe restos por ĉiuj.

Se diri sincere, mi, ekzemple, ne tre bone konas teorie la tuŝintan problemon. Sed rilate al la interna ideo de Esperanto, rilate al ĝia praktika efektiviĝo mi voĉu ankaŭ sincere.

...Ho, simpatiaj verduloj! Dum la someraj tendaroj mi vidis viajn diable brilantajn okulojn. En (bedaurinde raraj) konfesaj rakontoj mi aŭdis viajn sakramentajn admirojn pri la lingvo, pri la movado, pri ĝiaj homoj. Kiel do titoli tiun altan spiriton, tiun belan "novan senton", varmigantan la esperantistajn korojn?..

Jen mi imagas por momento, ke la tutmonda komuna lingvo estiĝis per mia gepatra lingvo. Kaj mi veas. Ĉar en tiu okazo la lingvo vere estus nura ilo. Nome pro tio mi ne volas vidi mian karan gepatran lingvon en la nenatura por ĝi rolo. Jes, en nenatura, artefarita rolo, ĉar de la pratempaj jaroj ĝia "interna ideo" estis tute alia.

Mala situacio okazas pri Esperanto. Krom i l a funkcio ĝi kapablas ankaŭ fermenti vere novan homan emon, kiu rekte kaj intense unuigas malsamlingvanojn - unuigas akorde kun aliaj progresivaj ideoj.

V. Ĝ.

KIEL NOMI LA KLUBON?

La nomo de E-klubo estas tre grava afero. Mi ne parolos pri konkretaj nomoj de E-klubo. Tio estas kluba afero - nomi sian klubon "Revo" aŭ alie. Sed pri kio okupiĝas la klubo, ekzemple, "Verda ho-

rizonto" - tio devas esti komprenebla por ĉiuj, kaj unusvice por neesperantistoj.

Multaj ne komprenas, kio estas E-klubo, kaj opinias, ke tio estas klubo, kie oni nur lernas la lingvon. Ne komprenante taskojn de E-klubo, la instancoj ofte ne volas helpi al propagando de la lingvo Esperanto. Sed ĉiuj kontraŭuloj de Esperanto tute ne estas kontraŭ internaciaj ligoj de sovetia junularo.

Ĉiuj multe parolas pri internacia amikeco. Esperantistoj ne parolas multe pri ĝi, sed ĉiutage ĝin realigas. Kaj de plej grava tasko de E-klubo estas internacia amikeco, tial ĉiuj niaj E-klubo devas nomiĝi nepre Esperanto-klubo de Internacia Amikeco. Ja niaj taskoj estas similaj al tiuj de la Klubo de Internacia Amikeco. Al demando, kion signifas la vorto "Esperanto" antaŭ la vortoj "Klubo de Internacia Amikeco", ni povas diri, ke nia klubo havas malgrandan diferencon de ordinara KIA, kie laborlingvoj estas diversaj naciaj lingvoj, precipe la rusa, - ĉar en nia KIA estas unu laborlingvo - Esperanto, kiun tre facile ĉiuj eklernas. Por oficialaj instancoj ĉi tiu klarigo estas sufiĉa kaj komprenebla, kaj ili plezure subtenas la klubon.

Kompreneble, post plena oficialiĝo ĉiuj E-klubo de IA komencas propagandi la lingvon kaj poste instrui ĝin, kaj nur poste aranĝas internaciajn korespondligojn. Sed tio ne gravas. Sciante, ke EKIA estas preskaŭ ordinara KIA, nur ĝia laborlingvo estas Esperanto, kiun kompreneble oni devas ellerni, la instancoj ne malhelpos nian laboron, eĉ ofte helpos, ĉar ordinara KIA ne havas sukcesojn similajn al tiuj de EKIA.

Ekzemple, mi opinias, ke sukceso de nia E-klubo, subteno flanke de preskaŭ ĉiuj oficialaj instancoj, eĉ de la regiona partia komitato, estas precipe tial, ke ni prezentas ĝin kiel EKIA, sed ne reklamas, ke la klubo disvastigas la lingvon Esperanto (kvankam kompreneble ni tion faras, ĉar sen tio la klubo ne povus funkcii). La oficialuloj scias, ke ni okupiĝas pri la lingvo, sed ne kontraŭas, ĉar ili komprenas, ke ni devas plibonigi nian lingvoscion kaj plimultiigi niajn vicojn.

Tial mi proponas, ke ĉiuj E-klubo nomiĝu por oficialulej nur kiel Esperanto-Klubo de Internacia Amikeco ("..."), ĉar nia "pura" nomo - E-klubo - al ili ofte ne estas komprenebla kaj ne plaĉas. Laŭ mia opinio, tiu malgranda ruzo donos grandan utilon.

V. Grigorenko, prezidante de Poltava Urba Esperanto-Klubo de Internacia Amikeco.

INFORMO EL TULA

Nia E-klubo neniam estis tre aktiva kaj granda, aŭ havis altan lingvan nivelon, sed antaŭnelonge niaj aferoj iĝis ankoraŭ pli malfacilaj - preskaŭ ĉiuj malnovaj gnoj malaperis, restis nur kelkaj homoj. SED LA KLUBO NE MORTIS. Autune, kvankam multaj personoj estis okupitaj pri agrikulturaj laboroj, ni sukcesis organizi E-kurson kaj renkontiĝon kun ĉefaj turistoj. La 14-an de decembro ni aranĝis Zamenhofan vesperon por neesperantistoj, en kies programo estis: prelegoj pri la vivo de Zamenhof kaj pri historio de Esperanto, lumbildoj pri someraj aranĝoj k. a.

Por fari nian laboron pli interesa, la estraro de la klubo decidis enkonduki novan fakon - tiun de arto kaj historio. La fako jam organizis veturon al Moskvo kun vizitoj al diversaj muzeoj, vesperon pri J. S. Bach. Ni ankaŭ planas vesperojn pri Beethoven, Leonardo da Vinci k. a. La E-klubo konstante eldonas murgazeton "Verda frateco", kie oni informas pri la kluba laboro, pri eventoj en politika vivo de nia lando kaj aliaj landoj, pri kultura vivo ktp.

Nun, post kiam Tula ricevis la honoran titolon de urbo-heroo,

nia vivo kaj E-agado plivigliĝas. Kiel ĉiuj sovetaĵoj, tutaj ge-
esperantistoj volas per Esperanto batali por mondpaco kaj interna-
cia amikeco!

S. Pantelejev, prezidanto de Tula E-klubo "Solidareco".

KIEN SKRIBI LA NOTOJN?

La unuan fojon en la jam pli ol 10-jara ekzisto de SEJM estas aperigita "Jarlibro de SEJM". Iama "Sekretaria Libro" plenrajte transformiĝis al pli bona formo kun pli belsena titolo.

Sed mankojn tiu ĉi libro havas. Mi ne menciis ne tre bonan kvaliton, kiu devas esti tamen multe pli bona, ĉar la libro estas ĉiutaga helpilo de ĉiu SEJM-aktivulo. Mi volas tuŝi la alian mankon, pri kiu kulpas la kompilanto: kie estas la lokoj por enskribi diversajn korektaĵojn kaj aldonojn? Jen antaŭ mi kuŝas la 13-a numero de "Kurte", kies preskaŭ duono enhavas informojn por kompletigo kaj korekto en la Jarlibro. Kompreneble, la alian telefonnumeron de E. Kolker estas facile enskribi - nur ses ciferojn, sed kien skribi la pli ampleksajn korektojn? Ĉu multe da loko estas lasita por enskribi la adresojn de novaj SEJM-subtenantoj? Jam aldoniĝis al ilia listo 10 novaj adresoj, sed la spaco por enskribi ilin ne sufiĉas...

D. Cibulevskij (Ĥarkov).

225-JARA JUBILEO

La 16-an de junio 1977 plenumiĝos 225 jaroj de la naskiĝo de la nacia heroo de la baŝkira popolo Salavat Julajev, kiu estis kuraĝa kunbatalanto de Ĵemeljan Puĝaĉov. Dum la Kamparana milito de 1773 - 1775 ili kune militis por liberigo de la popolo, suferinta pro ekspluatado. Tiu ĉi datreveno estos festata en nia urbo, portanta la nomon de la heroo.

Buroo de la urba partia komitato konfirmis la jubilean komisionon kaj planon de la jubileaj aranĝoj. La tuta preparlaboro kaj la solenaĵoj mem estos efektivigitaj sub la slogano de la triumfo de la lenina nacia politiko kaj la amikeco de la popoloj en nia lando.

Okaze de la jubileo en la urbo oni planas aranĝi scienc-teorian konferencon, organizi ekspozicion de bildoj, dediĉitaj al la Kamparana milito, la vivo kaj agado de Salavat Julajev. En la urbo gastros Baŝkira drama teatro je la nomo de M. Gafuri kun la dramo "Salavat Julajev" de Mustaj Karim aŭ Baŝkira teatro de opero kaj baleto kun la opero "Salavat Julajev" de Zagir Ismagilov. Okazos kolektivaj ekskursoj laŭ la historiaj lokoj, ligitaj kun la Kamparana milito, dum kiuj oni rakontos al la gastoj pri la rolo kaj signifo de tiu evento. Estas antaŭviditaj temlibraj ekspozicioj, sportaj konkursoj kaj aliaj aranĝoj dediĉe al la jubileo.

Ni invitas vin partopreni en la solenaĵoj honore al la 225-jara jubileo de Salavat Julajev.

Bonvenon, karaĵoj geamikoj, en nian urbon!

V. Vjazovcev (E-klubo "Verda aŭroro", Salavat).

MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO

LA REDAKCIO RICEVIS

- la informilon "Lumo verda" N^o1(14). La numero enhavas: informon pri la Universala Kongreso en Ateno kaj koncizigitan paroladon de la prezidanto de UEA H. Tonkin dum ĝia malfermo, intervjuon kun B. G. Kolker (el "Amikeco"), konstantan rubrikon "La klubanoj prezentas sin", rakontojn de N. Aroloviĉ kaj H. Vasiljeva pri la someraj tendaroj,

sciigon pri la gravaj E-materialoj en "Moskvaj novaĵoj" kaj "Soveta Unio" k.a. Aldone estas donata programo (ruslingva) de la speciala kurso pri interlingvistiko en la Baŝkira ŝtata universitato.

- bultenon de la problema grupo pri apliko de Esperanto en la scienco (sub tiu ŝildo kaŝas sin la scienc-teknika fako de SEJM) - "Scienco sen limoj". En la enhavo: laborplano de la terminara centro, "Metodiko de laboro kun "Slipara Vortaro" de R.Eichholz" de V.Gakalenko, artikoloj de A.Gonĉarov "Kiel kunlaboru samfakuloj" kaj de M.Ziskandoviĉ "Elektroteknika sekcio informas", anoncoj.
- "KF-1" - dumonatan informilon de la kolektanta fako. Ĝi enhavas daŭrigon de la membrolisto kaj diversajn anoncojn.

KOMENGO DE E-AGADO EN IĜEVSK

La 6-an de januaro en la ĵurnalo "Komsomolec Udmurtiji" aperis artikolo "Esperanto - lingvo de amikeco" de V.Zibenkes. Rezulte de tiu artikolo 17 personoj el 6 lokoj de Udmurtio: Iĝevsk, Sarapul, Votkinsk, Nikolo-Sjuga, Glazov, Uva - aliĝis al la korespondkursoj ĉe Ufa E-klubo. La 19-an de marto okazis organiza kunveno de iĝevskanoj, kiuj studas en la korespondkursoj, kaj ĉe la Udmurta Ŝtata universitato fondiĝis E-klubo. Oni decidis kunveni dufoje monate.

V.Zibenkes (Sarapul).

DEZIRAS KORESPONDI

- Ĉiu el 35 membroj (komencantoj kaj progresintoj) de E-klubo en la urbo Smeredevo - kun gesamideanoj ĉiuagaĵaj el dudek urboj de Sovetio. Gvidanto - ing. Milorad DJURDJEVIĈ, str. Vuka Karadžiĉa 9, 11 300 SMEREDEVO, Jugoslavio.
- 20 gejunuloj (komencantoj kaj progresintoj) de E-klubo - kun gesamideanoj el ĉiuj sovetaĵ urboj. Gvidanto - Ernesto SLEZINGER, poŝtkesto 35, Rumanio-3400, CLUJ.
- 11 lernantinoj (19-30-jaraj) - kun sovetaĵ gesamideanoj. Gvidanto - Bela HUBAY, p.f. 70, Hungario-5100, JASZBERENY.

Sendis R.Grinŝpan (Taŝkento).

LA KOMITATO DE SEJM GRATULAS ĈIUJN SEJM-KLUBOJN, SUBTENANTOJN KAJ AKTIVULOJN OKAZE DE LA 1-A DE MAJO - FESTO DE LA INTERNACIA LABORULA SOLIDAREGO - KAJ DEZIRAS PLUJN SUKCESOJN EN NIA KOMUNA INTERNACIIIS-MA AGADO!

La informilo estas uzenda nur enlande! Fintajpita 23.4.77.
Ĉiujn materialojn per "Aktuale" sendu laŭ la adreso de la redaktoro:
121019 Moskvo G-19, do vostrebovanija, Aroloviĉu Viktora Semjonoviĉu.